



Aplikoj de informaj teknologioj en Esperanto-Muzeo Svitavy

Pavla DVOŘÁKOVÁ (Ĉeĥio)

0. Enkonduko

Esperanto-Muzeo en Svitavy, fondita la 20-an de septembro 2008, estas organiza unuo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Laŭstatute ĝi estas sen propra jura memstareco kaj ĝian agadon plene volontule senpage prizorgas membroj de la Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA (loĝantaj kaj en Svitavy, kaj en la tuta lando), sub gvido de Libuše Dvořáková, iniciatintino de la projekto. En la grupo aktivas i.a. regulaj KAEST-anoj Petr Chrdle (internaciaj rilatoj) kaj Miroslav Malovec (tradukoj, historio, literaturo kaj precipe ciferecigado - kadre de la aparta kunlaboranta grupo). La muzeo situas en teretaĝo de la Ottendorfer-Domo rande de la ĉefa placo, kie laŭ la kontrakto kun la urbo ĝi estas en senpaga luo. Rekompence ĈEA kunlabore kun la loka klubo propraforte prizorgas la ejon kaj disponigas ĝin ankaŭ por aranĝoj por la loka publiko kaj laŭ siaj ebloj pere de Esperanto diskonigas la urbon kaj la regionon en eksterlando. La muzeo laboras laŭ sufiĉe limigita budĝeto bazita sur ĈEA-financoj kaj individuaj donacoj kaj de la eksteraj instancoj ĝi ricevis ĝis nun por sia funkciado (do ne parolante pri la fondoĵaro) nur malgrandajn porokazajn subvenciojn por konkretaj projektoj

En la muzeo okazas ĉiujare nova tema ekspozicio. Nur en 2016 ĝi escepte ne estis realigita, precipe pro multa laboro pri la Antaŭkongresa Ekskurso de UEA en Svitavy kaj pri la balota ĈEA-Kongreso. Inaŭguro de la nova ekspozicio preparatas por la 10-a de junio 2017. Krom ekspozia aktiveco kaj diversaj aranĝoj en la muzea ejo kaj krom prizorgo de la biblioteko kaj la arkivo la muzeo okupiĝas ankaŭ pri aliaj agadsferoj, por kiuj ĝi nepre devas uzi modernajn teknikaĵojn kaj teknologiojn.

Ekde 2009 mi estas membro de la Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA. Miaj ĉefaj taskoj estas preparo kaj disponigo de fizikaj kaj virtualaj ekspozicioj, redaktado de la muzeaj retejoj kaj kunlaboro en cifereciga projekto. Tial mi volus koncize resumi la nuntempan staton kaj atingojn en tiu ĉi sfero kaj sekve ankaŭ kelkajn niajn problemojn, kiujn ni alfrontas kaj planojn por proksima estonto.

1. Teknika ekipo

Por la laboro en Svitavy mem disponeblas nuntempe **kvar komputiloj** (unu por bibliotekistino, unu por uzantoj, unu por la deponejo, unu tekkomputilo

uzebla dum projekciado), **ekstera deponej-disko, projekciilo kun reproduktiloj kaj tolo, skanilo kaj printilo**. En la muzea ejo disponeblas **senpaga sendrata aliro al Interreto**. La teknikaĵoj estas funkcikapablaj, tamen jam plejparte meritis anstauaŭon per pli moderna tipo, precipe la komputilo por uzantoj. Bonŝance en oktobro 2016 ni akiris proponon por donaca livero de la nova komputilo, kiu planatas realiĝi en printempo 2017.

Membroj de la **cifereciga laborgrupo** de ĈEA, kiuj agas sendepende de la muzeo, sed estas kun ĝi kaj ĝia celo tamen parte ligitaj, laboras hejme kun **apartaj skaniloj**, uzante oficialan licencon por la **programaro ABBYY 11** por signorekono. La plej grandan laboron ĉi-rilate faras Miroslav Malovec kaj Vladimír Türk. En la jaroj 2015-2016 ĈEA povis ĝui ankaŭ ampleksan ciferecigan laboron de la portempa dungito Jan Pospíšil, kiu estis pagata kadre de la projekto pere de la Laborinstituto. Koncerne uzon de modernaj teknologioj, sufiĉe multaj ekspoziciaĵoj en la konstanta ekspozicio estas akompanataj per **QR-kodoj por uzantoj de plurfunkciaj** (ankaŭ t.n. *inteligentaj*) **poŝtelefonoj**, kiujn en aprilo 2015 almetis Michal Matúšov kaj Václav Zouzálík. La vojaĝelspezoj estis kovritaj el mono restinta el la antaŭa monpeto de Michal ĉe la Fondaĵo Vikimedio. Post aktualigo de la daŭra ekspozicio ili devos esti por elektitaj temoj parte kompletigitaj.

2. Virtualaj muzeaj kolektoj

Krom fizikaj ekspozicioj sur paneloj kaj en libro- kaj tabloŝrankoj ni pretigas kaj disponigas ankaŭ virtualajn kolektojn. Ili troviĝas unue en la muzea ejo mem, nome **en la komputilo por uzantoj kaj esploristoj**, kaj mallongaj specimenoj ankaŭ **en la informa tuŝpanelo**. En la komputilo surloke konsultebla estas kolektitaj precipe multmediaj dosieroj rilataj precipe (sed ne nur) al ĉeĥa Esperanto-movado, elektitaj artikoloj pri Esperanto el la ĉeĥa gazetaro, fotokolektoj de filatelaĵoj, bildkartoj, kovriroj de famaj libroj, senpage elŝuteblaj pdf-libroj ktp.



surfote: esplorkomputilo kun virtualaj kolektoj kaj informa tuŝpanelo

Krome mi uzas du eblecojn por ilia diskonigo en interreto, por ke ili povu servi ne nur al la ĉeĥa publiko, sed ankaŭ al la internacia Esperanto-komunumo. La unua estas **oficiala muzea retejo** www.muzeo.esperanto.cz, kiun mi redaktas kaj kiu krom ĝeneralaj kaj kontaktaj informoj kaj dulingvaj aktualaĵoj enhavas ankaŭ Fotogalerion. Nuntempe ĝi nuntempe entenas entute 55 fotoalbumojn - ĉiu kun ĉ. 40-50 fotoĵoj, grandparte provizitaj per konciza priskribo. Ĝi prezentas ne nur ekspoziciojn kaj aranĝojn en la muzeo, sed ankaŭ diverstemajn virtualajn kolektojn. Ekzemple al nia ekspozicio "*Kolektado kaj Esperanto*" mi pretigis 6 albumojn pri unuopaj specoj de kolektmaterialoj.

En la retejo troviĝas ankaŭ **paĝo pri ĈEA-biblioteko**, kiu situas en la muzeo kaj en kiu ĝis nun estas registritaj pli ol 17 000 bibliotekaj unuoj. La katalogigon prizorgas volontule Marie Čumová el la loka Klubo de amikoj de Esperanto. Sube de la paĝo libere elŝuteblas la biblioteka **katalogo** kaj ankaŭ 2 katalogoj de duoblaĵoj kaj multoblaĵoj por interŝanĝo (aparte por libroj kaj gazetoj), do tiamaniere ni uzas modernajn teknologiojn ankaŭ por internacia kunlaboro kaj kompletigado de nia kolekto. Ĉar en la komenca periodo ĈEA ne posedis sufiĉajn financajn rimedojn kaj specialajn konojn por aĉeto de profesia biblioteka programaro, la registrado de la dokumentoj estas realigata en simpla formo en Excel. La dokumentoj estas serĉeblaj laŭ diversaj kriterioj, sed la tema priskribo estas nur sufiĉe ĝenerala en 16 bazaj kategorioj, do profesia tema aŭ sistema klasifiko ne estas realigata. Tamen laŭ nia ĝisnuna sperto por nia bezono ĝi ne estas nepre necesa.

La paĝo estas subpaĝo de la ĈEA-retejo www.esperanto.cz. Ĝia redakta sistemo estas bedaŭrinde jam malnoviĝinta kaj iom peza precipe kreon de fotogalerioj kaj ne ebligas i.a. dinamikan prezenton en plurfunkciaj telefonoj kaj tabledoj. Bedaŭrinde ĝis nun ni ne sukcesis trovi kompetentan volontulon, kiu prizorgus kompletan projekton kaj transiron al kompleksa pli moderna kaj pli komforta sistemo. La unua provo pri moderniĝo kaj prilaboro de la nuna versio en la redakta sistemo WordPress okazis helpe de la ĈEA-estrarano Miroslav Hruška en septembro 2016. Tamen, pro apero de pluraj problem(et)oj kaj tendenco al laŭeble pli kompleksa solvo (ekz. rilate al kunligo kun ampleksa cifereca datumbazo de ĈEA) kaj ankaŭ pro aliaj urĝaj taskoj la projekto estis dume prokrastita por plua pridiskuto kaj serĉado de pliaj kunlaborantoj, kiuj helpus trovi kaj realigi optimuman (aŭ almenaŭ mallongdaŭre akcepteblan) solvon.

Nia aparta specifaĵo, kiun ni ascie aliaj Esperanto-muzeoj aŭ bibliotekoj tiaforme ne havas, estas **muzea paĝo ĉe la socia retejo Ipernity**, kiun mi fondis la 5-an de januaro 2011. Dum ses jaroj da ekzisto ĝi ekhavis **ĉ. 1900 multmediajn dosierojn en 50 albumoj**. La strukturo de la retejo ne ebligas kreon de iu sistema datumbazo laŭ biblioteka modelo, kiun ni malhavas kaj bezonas, sed ĝi respegulas nuntempan interagan komunikmodelon kaj postulojn

de la uzantoj. Tiel ni klopodas kapti atenton de la vizitantoj per regula alŝuto de diverstemaj dosieroj, ĉu seriozaj, ĉu parte amuzaj. **Ĝis fino de decembro 2016 la retejo havis pli ol 120 000 virtualajn vizitojn** (unu vizito egalas al unu vizito el unu IP-adreso el unu krozilo dum 24 horoj, sendepende kiom da dosieroj oni malfermas) **el pli ol 90 landoj de ĉiuj kontinentoj**. La muzeo estas en la **kategorio de la paganta membro** (50 Eŭroj por du jaroj, ekde 2015 pagataj de ĈEA), kio ebligas al ni laŭamplekse nelimigitan alŝutadon kaj al ĉiuj (do ankaŭ al senpage registritaj membroj senpagan ne nur spektadon, sed ankaŭ elŝutadon de iuj ajn dosieroj al ilia komputiloj. Nemembroj de Ipernity rajtas rigardi fotoĵojn kaj sekvi videojn, sonregistraĵojn kaj blogajn artikolojn, sed ne tekstajn dokumentojn, kaj ne rajtas ion ajn elŝuti.

surfote: enkonduka muzea paĝo ĉe Ipernity (stato 4.4.2017)

En 2013 teamo de Ipernity realigis modernigon de la retejo kaj bedaŭrinde ne ĉiuj ŝanĝoj montriĝis esti vera pliboniĝo. Krome oni multe limigis rajtojn de senpage registritaj membroj kaj tiel fakte kaŭzis grandpartan detruon de la ĝis tiam sufiĉe aktiva multmembra Esperanto-komunumo; tamen post iom da tempo da parta stagnado ni denove registras novajn membrojn. Kaj aperas ankaŭ nova fenomeno, nome ke kreskas anonimaj vizitoj de la dosieroj, do vizitoj de neIpernitianoj. Mi klopodas laŭeble precize priskribi ĉiujn dosierojn, tiel ke se iu ajn serĉas ekz. en Guglo iun specifan temon rilatan al Esperanto, ofte aperas en la serĉrezultoj ĝuste niaj dosieroj. Tio estas ĝojiga fakto, ĉar nun la paĝo

komencas plenumi sian funkcion ankaŭ ekster la membraro por ĝenerala komunumo. Ipernity minacita de pereco en januaro 2017 estis bonŝance savita (almenaŭ portempe) de la nove fondiĝinta societo de la Ipernity-uzantoj. En januaro 2017 mi sukcesis ĉiujn dosierojn en apartaj albumoj (eĉ se sen metadaturoj) are elŝuti kaj konservi (por kazo de nuligo de la retejo), sed nun ekestis nova espero, ke la retejo plu vivos kaj ke ankaŭ malfortiĝinta Esperanto-komunumo ekhavas la novan ŝancon renoviĝi kaj denove kreski.

La muzeo diskonigas siajn aktivecojn kaj novaĵojn ankaŭ pere de la plej uzata socia reto, t.e. **Facebook** (Vizaĝlibro). Tuj ekde fondiĝo de la paĝo ĉe Ipernity ni havas ankaŭ internacian grupon *Amikoj de Muzeo de Esperanto en Svitavy* (fonditan en 2012 de mi), nuntempe kun 347 membroj el pli ol 30 landoj. Ĝiaj membroj aŭtomate ricevas anoncojn pri niaj novaj kontribuadoj. Krome en majo 2014 Matěj Nárožný el Svitavy fondis apartan ĉeĥan-esperantan oficialan paĝon de la muzeo. Tiuj ĉi komunikiloj servas por informi ne nur pri aktivecoj de la muzeo mem, sed pere de la muzeo pri Esperantaj kaj aliaj utilaj klerigaj temoj. Ĝi estas unu el rimedoj por montri al la urbestro niajn internaciajn ligojn, do nombro de membroj, aŭ tiuj, kiuj vizitis aŭ ŝatis niajn kontribuadojn, estas por ni tiucele grava.

Interesajn detalojn kaj kompletigajn informojn pri historio de ĉeĥa Esperanto-movado mi sukcesis ekhavi **esplorante interrete i.a. enhavon de malnovaj esperantaj bildkartoj, ofertataj en aŭkciaj portaloj por kolektantoj** (ekz. Delcampe.net, eBay, ĉeĥa Aukro k.a.). Tiel en aŭtuno 2016 mi ekz. eksciis almenaŭ virtuale pri la plej malnova al ni ĝis nun konata palpebla signo de Esperanto-vivo en la mikroregiono Bohemia-Moravia Landlimo, en kiu situas nia muzeo. Temas pri bildkarto sendita en 1911 al Anglio de iu Antonín Helbich, studento pri pedagogio, el la urbo Litomyšl. Ankaŭ pere de interreto mi "elfosis" la informon, ke bedaŭrinde post nuraj kvin jaroj en 1916 tiu ĉi junulo mortis kiel soldato en la unua mondmilito. Similajn detektivajn aktivecojn mi komencis realigi ankaŭ pri aliaj personoj kaj landoj. Jam estis kolektitaj neneglektblaj rezultoj, kiujn mi planas baldaŭ iom post iom aperigi, ĉu pere de la muzeaj ekspozicioj, ĉu pere de la artikoloj en la muzea retejo aŭ en Esperanto-gazetaro.

4. Faka kleriĝado pri kaj pere de informaj teknologioj

Nia nova prioritato estas ankaŭ laŭeble sistema altigo de faka klerigiteco en fakoj muzeologio kaj bibliotekscienco kaj informaj teknologioj. En 2016 mi frekventis dum kvar monatoj du senpagajn **interretajn kursojn**, organizitajn de la Moravia Landa Biblioteko en Brno: unu kompleksan bibliotekistan kurson, en kiu mi povis kompletigi miajn sciojn pri la nuntempa stato de la fako, en kiu mi

jam multajn jarojn ne plu laboras, kaj specialan kurson pri ciferecigo en bibliotekoj. La tekstojn mi disponigis ankaŭ al miaj kolegoj en la cifereciga grupo. La informoj sendube helpas nin labori plu pli sisteme kaj utiligi modernajn informfontojn. Jan Pospíšil en 2015 kaj mi en 2016 partoprenis en Prago nome de la muzeo tutŝtatan konferencon "*Bibliotekoj, muzeoj kaj arkivoj en la cifereca mondo*", kiu ebligis al ni ekhavi pli konkretan imagon pri la nunaj tendencoj kaj laborprocedoj en la memorinstitucioj kaj donis al ni almenaŭ inspiron por laŭebla pliproksimiĝo al tiu ĉi trendo. Kolegino Dagmar Martinková el la klubo en Svitavy samtempe frekventas kurson pri Muzea pedagogio en la Moravia Muzeo kaj Galerio en Brno. Sekve ni ankaŭ celas komenci krei allogajn lektorajn programojn por celgrupoj en nia muzeo, kiun sendube ne povas malhavi uzon de la teknikaĵoj kaj interretaj teknologioj. Espereble la kurso disponigos al ni novajn impulsojn kaj konsilojn por realigo de tiaj aktivecoj.

En la biblioteka subpaĝo de la muzea retejo nove troviĝas ankaŭ **retligilaro** pri la plej gravaj dokumentoj kaj ĉeĥlingvaj (kaj parte ankaŭ esperantlingvaj) manlibroj rilataj al muzea kaj biblioteka laboroj, kiuj povas servi kiel studmaterialo por aŭtodidakta kleriĝado kaj helpas tiel plikvalitigi nian agadon. Kiom ni sukcesos kadre de niaj amatoraj eblecoj, montros la tempo.

5. Problemoj

La dekomenca problemo, kiun dum kreado de tiaj kolektoj ni konstante alfrontas, estas tiu, **ke pro financaj kaj teknikaj kialoj la muzeo kompreneble posedas fizike ne tro multajn deziratajn originalajn kolektmaterialojn de historia valoro** (ne kalkulante librojn kaj gazetojn). Tial por kompletigo de la kolektoj mi uzas ankaŭ fotaĵojn el Interreto, kiuj ne plu estas sub rekta aŭtora protekto kaj uzeblas aŭ libere aŭ almenaŭ por la nekomerca kleriga celo laŭ la principo de "Justa uzo", aŭ koncerne nuntempan movadon ili rilatas al personoj aŭ institucioj, kiuj konatas kaj principe elserĉeblas. Bedaŭrinde la nuntempa sistemo de la **aŭtora rajto** (aŭ eble pli precize kopirajta monopolo, kiu ofte ne sekvas prioritare interesojn de la aŭtoroj mem) multe malhelpas naturan diskonigon de nekomercaj dokumentoj kaj grave bremsas kaj ĝenas ankaŭ min en tiu ĉi sfero. Tio paradokse nemalofte koncernas ankaŭ historiajn fotaĵojn, kiuj principe jam devintus esti liberaj, ĉar la skanintoj foje alproprigas al si la rajton kvazaŭ ili estus mem la posedantoj.

Koncerne publikigon en Ipernity, se mi konas la originan aŭtoron kaj kapablas trovi kontakton al li/ŝi, kutime laŭeble mi antaŭe petas konsenton, aŭ mi minimume donas rekompence en priskribo pliajn informojn pri li/ŝi, kune kun ligilo al la fonto aŭ al la origina retejo, tiel kreante por li/ŝi senpagan reklamon en interreto. Kompreneble la tuta ofica proceduro en la nuna kvanto de

prilaboritaj dosieroj estas grandega kaj ideale ĝi postulus kelkajn pagatajn dungitojn, kiujn ni bedaŭrinde ne havas, ĉar ĉion ni faras volontule kaj senpage. Sed tamen ni ne volas rezigni pro tio pri plenumado de la muzeaj celoj, kun espero, ke aktivaj esperantistoj mem ĝojos, ke ilia laboro estas tiamaniere - kompreneble komplete neprofitcele - diskonigata. Kompreneble ni diskonigas neniujn verkojn, kiuj estas nuntempe aĉeteblaj aŭ rekte signitaj kiel kopirajtitaj (aŭ se jes, temas nur pri specimenoj kaj kun aparta konsento de la rajtoposedantoj).

Plia problemo estas ankaŭ nia **amatoreco kaj disigiteco** en la tuta Ĉeĥio, kio malgraŭ nia entuziasmo, lernemo kaj laboremo parte malhelpas efikan laboron, ĉar eĉ modernaj teknologioj per si mem ne en ĉio povas anstataŭi eblecon de rekta fizika interagado en la teamo (eĉ se tranktante ĝuste pri uzo de tiuj teknologioj aŭ procedoj). Kun kreskantaj ideoj kaj planoj ankaŭ pli kaj pli senteblas **manko de kunlaborantoj** pri tiu ĉi ampleksa agadsfero.

6. Taskoj kaj planoj

Klopodante informiĝi kaj orientiĝi pri uzo de modernaj teknologioj en la muzeoj ĝenerale, mi devas konstati, ke pro manko de profesiuloj kaj financaj rimedoj nia muzeo bedaŭrinde ne kapablas sekvi la plej novajn tendencojn (temaj aplikoj por inteligentaj telefonoj ktp.).

Tamen eblas espereble ne tro malmodeste diri, ke kompare al la disponeblaj rimedoj la rezultoj de nia laboro nemalmultas kaj ke la muzeo apartenas al la plej modernecaj memorinstitucioj kadre de la tuta nuntempa Esperanto-movado.

1. Teknika ekipo kaj virtualaj kolektoj en la muzea komputilo

En printempo 2017 ni dezirus aĉeti novan komputilon disponeblan en la muzea ejo por vizitantoj kaj esplorantoj kaj ekipi ĝin per bezonata programaro.

Al na nova komputilo por uzantoj mi celas iom post iom kompletigi kaj aktualigi la nuntempajn multmediajn virtualajn kolektojn (ciferecajn aŭ ciferecigitajn tekstojn, inkluzive librojn kaj gazetojn, fotogaleriojn pri historio de Esperanto-movado, de Esperantaj bildkartoj, filatelaĵoj kaj aliaj kolektmaterialoj, televid- kaj radioelsendojn pri Esperanto, filmojn, parolajn kaj muzikajn registraĵojn k.t.p.). La unua renovigita serio estas preparata por disponigo kadre de la inaŭguro de la nova eskpozicio sabate la 10-an de junio 2017.

2. Muzea retejo kaj ĈEA-datumbazo

Nia delonga revo estas laŭeble progresi en finkreo de la pli moderna retejo kaj en trovo de taŭga solvo por ĈEA-datumbazo, parte disponebla ankaŭ interrete. Temas tamen pri problemo postulhava organize, teknike, enhave kaj finance kaj nepre bezonas akiron de pluaj kompetentaj kunlaborantoj, kiuj daŭre estas

serĉataj. Kun tiu temo estas ligita ankaŭ laboro de la cifereciga grupo - do ni planas plu labori pri kreado, polurado, klasifikado de ciferecigitaj tekstoj kaj pri ilia divido laŭ la aŭtora rajto kaj laŭebla iom-post-ioma disponigo al la legantaro. Pluraj paŝoj ĉi-voje jam estis faritaj.

3. Uzado de interreto dum esplora muzea agado pri historio de la movado

Por ke la muzeo povu esti prave nomata kiel memorinstitucio, sendube necesos nun ankaŭ pli sisteme okupiĝi pri kolektado, ciferecigado, konservado kaj alirebligado de materialoj pri historio de frua Esperanto-movado (ĝis nun ni dediĉis grandan parton da laboro ankaŭ al la nuntempa stato), precipe (sed ne nur) kadre de nia bohemika specialiĝo. Ni celas diskonigi akiritajn informojn i.a. pere de Esperanta Vikipedio. Mi komencis ekzemple pri analizo de sur teritorio de Ĉeĥio loĝantaj personoj en Adresaro de fruaj esperantistoj, kies ciferecigon ĉefprizorgis Marek Blahuš kaj jam en la unua etapo mi venis al pluraj tre interesaj malkovroj. La informoj estos iom post iom publikigitaj.

4. Ne mankas ankaŭ novaj ideoj kaj tute **novaj projektoj**, kiuj troviĝas en la komenca etapo kaj por kiuj mi ankoraŭ serĉas volontulajn kunlaborantojn (ankaŭ eksterlande!). Ili fakte pli rilatas al la bibliotekista sfero ol al prizorgo de tridimensiaj muzeaj objektoj. Ili ĉiuj sufiĉe ambicias kaj havas altajn postulojn por sia realigo. Tamen la unuaj paŝoj estis jam faritaj kaj espereble kadre de la kondiĉoj almenaŭ iom post iom progresos kaj alportos baldaŭ la unuajn partajn videblajn rezultojn.

4.1. Informi fakan publikon pri ekzisto de bonkvalitaj artikoloj kaj libroj pri Esperanto kaj interlingvistika kaj al ĝi rilata temaro, ne nur en Esperanto mem, sed ankaŭ en la ĉeĥa, angla, germana, franca kaj ev. aliaj lingvoj. **Disponigi interrete bone prilaboritajn faktografiajn bibliografiojn** kaj koncentriĝi prioritare pri kvalitaj artikoloj aŭ altlernejaj laboraĵoj, kiuj plentekste senpage haveblas en interreto, do la bibliografian citaĵon kompletigadi per hiperteksta ligilo al la origina informfonto (tio rilatas ekz. rete elŝuteblajn germanlingvajn prelegarojn de Gesellschaft für Interlinguistik, EES aŭ artikolojn kolektitajn laŭ Scholar Google). La listoj estas jam kreataj kaj la unua versio estas planata por diskonigo en la jaro 2017. Nuntempe finpretas ekzemple listo de seminaĵoj kaj diplomaj interrete plentekste disponeblaj ĉeĥlingvaj laboraĵoj rilataj al Esperanto. Por tiu ĉi aktiveco estos nepre serĉataj ankaŭ kunlaboremuloj ekster Ĉeĥio.

4.2. Prilabori artikolan bibliografion de ĉeĥaj aŭtoroj en "Scienca Revuo" farita laŭ la ĝenerala bibliografio, kun rektaj ligiloj al interrete haveblaj plenaj tekstoj disponeblaj laŭ la licenco "Open Access" en la oficiala retejo de la gazeto. Pluraj tekstoj plu havas ne nur sian biografian kaj historian valoron, sed plu estas uzeblaj. Ĝi planatas aperi ĝis fino de 2017 aŭ komence de 2018.

4.3. Disponigi elektitajn ciferecformajn dokumentojn en aŭ pri Esperanto al interrete publikej alireblaj Ciferecaj Bibliotekoj de la Nacia Biblioteko de Ĉeĥa Respubliko kaj de la Urba Biblioteko de Prago. Ekde 2015 okazas komenca preparentapo - traktado kun estrino pri bibliotekoj en la ministerio pri kulturo, elekto kaj postulhava finpretigo de taŭgaj jam ciferecigitaj dokumentoj laŭ profesiaj standardoj. Tiu ĉi prestiĝa projekto povus principe havi nemalgrandan influon al informado de la publiko pri Esperanto kaj al altigo de ĝia reputacio. Unue estos plej verŝajne disponigitaj tradukoj de verkoj de Karel Čapek, resp. parte ankaŭ ties spegulaj ĉeĥaj-esperantaj versioj por la Urba Biblioteko en Prago.

4.4. Akiri siglon kaj formalajn rajtojn por povi kontribui al Nacia artikola bibliografio per elektitaj valoraj artikoloj en aŭ pri Esperanto (prioritate laŭ bohemika principo - do de aŭ pri ĉeĥaj aŭtoroj, aŭ eldonitaj en Ĉeĥio aŭ rilataj teme al Ĉeĥio (sendepende de la loko de la eldono).

Ĉi-kampe gravas: 1) bone elekti taŭgajn dokumentojn, 2) scipovi ĝuste prilabori ilin laŭ la nunaj profesiaj standardoj (ne nur la formon de elektronika libro, sed precipe ĝian katalogigon laŭ la nova formato MARC21, kiu sufiĉe komplikas) kaj 3) pripensi taŭgan strategion por informi pri la dokumentoj fakan publikon en Ĉeĥio (universitatoj, instituoj de Akademio de Sciencoj, redaktejoj de fakaj gazetoj, fakaj institucioj, fakaj bibliotekoj k.a.).

Jam okazis unuaj serĉesploroj kaj kolekto de uzeblaj tekstoj, sed laŭ stato de laborfortoj kaj projekto estos sisteme ekita verŝajne nur komence de 2018.

Prioritatoj por elekto de dokumentoj por bibliografia prilaboro estos:

- 1) tema kvalito, aktualeco kaj utileco de la teksto por la publiko
- 2) laŭebla disponeblo de plena teksto de la dokumento en interreto

Koncerne aŭtorojn, ni celas koncentriĝi precipe pri

- 1) ĉeĥoj (ĉu esperantistoj, aŭ neesperantistoj) - laŭ la bohemika kompetenco de nia muzeo

- 2) esperantistoj eksterlandaj kun scienca kvalifiko kaj prestiĝo

- 3) aŭtoroj liberaj laŭ la aŭtora rajto (do forpasintaj ĝis 1947) - tiuflanke ni celas elĉerpi elektitajn artikolojn pri internacilingva temaro (ĉeĥlingve aŭ Esperante) el la jam ciferecigitaj malnovaj ĉeĥaj Esperanto-gazetoj (dum la jam okazinta analizo estis trovitaj nemalmultaj tekstoj, kiuj havas valoron ne nur historian).

Por tiu celo necesas prilabori ciferecigitajn dokumentojn tiel, ke estu aparte plu uzeblaj kaj prilaboreblaj unuopaj artikoloj, ne tutaj numeroj de gazetoj. Tio kompreneble postulas multan tempon kaj energion, sed la unuaj rezultoj jam ekzistas (precipe el ĉeĥaj gazetoj, ekz. "*Časopis českých esperantistů*", "*La Progreso*", "*Esperantista*").

Dume ni uzas kaj rezultojn de nia propra cifereciga laboro, kaj tiujn de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo en Vieno, liberigitajn en ĝia retejo.

7 Konkludo

Kompreneble, malgraŭ nemalmultaj atingoj ni havas ankoraŭ multon por perfektigi - tial laŭ niaj realaj eblecoj ni klopodas fari sian plejbonon kaj strebi al plua evoluigo de nia agado por disvastigo de Esperanto kaj por klerigado de la Esperanto-komunumo. Mi esperas, ke dum la sekvonta KAEST en novembro 2018 mi povos raporti pri pliaj novaĵoj rilate tiun ĉi temon.

Legantoj de tiu ĉi artikolo estas bonvenaj

- vizitadi niajn retejojn kaj Facebook-paĝojn kaj uzi tieajn dosierojn
- persone viziti la urbon Svitavy kaj nian muzeon, malfermitan dum al tuta jaro (ni pretas por vi aranĝi favorprezan tranokton en aŭ tuj apud la muzeo kaj laŭdeziran akompanan programon)
- kunlabori kun la Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA en interŝanĝo de ciferecaj kolektoj kaj spertoj
- helpi nin per viaj fakaj teknikaj rekomendoj aŭ konkreta partopreno en niaj projektoj, destinitaj por la tuta Esperantujo aŭ eĉ ekstera publiko

Al ĉiuj ĝisnunaj kunlaborantoj mi nome de la tuta Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA elkore dankas kaj antaŭĝojas pliajn kunlaboremulojn.

8 Kontakto kaj retligiloj

Redadreso de la muzeo

muzeo@esperanto.cz

Oficiala retejo de la muzeo

<http://muzeum.esperanto.cz/cs/>

Subpaĝo de la ĈEA-biblioteko

<http://muzeum.esperanto.cz/eo/cxefa/biblioteko>

Muzea paĝo ĉe Ipernity

<http://www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy>

Oficiala paĝo de la muzeo ĉe Facebook

<https://www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/>

Grupo Amikoj de Muzeo de Esperanto en Svitavy ĉe Facebook

<https://www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/>



Pavla Dvořáková (naskiĝis en 1966) studis socian informsciencon kaj biblioteksciencon (kun specialiĝo pri aplikita lingvistiko) en Filozofia Fakultato de Karola Universitato en Prago kaj sekve ankaŭ naturajn kaj muzikajn terapiojn kaj jungecan astrologion. Esperantiĝis en 1977 kaj ekde 1983 vaste aktivas en Esperanto-movado (origine en junulara kaj pedagogia). Progame ĉeforganizis kelkdekojn da diverstemaj aranĝoj. En 2008-2016 estrarano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj en 2010-2016 ĉefredaktoro de la asocia retejo. Krom diversaj aktivecoj por Esperanto-Muzeo en Svitavy, menciitaj en la enkonduko de la artikolo, ŝi okupiĝas precipe pri Vikipedio, sonregistraĵoj kaj kantado. Al KAEST-prelegaroj ŝi kontribuis per "*Multlingvaj tradukvortaroj en Interreto*" (2006) kaj "*Enkonduko al la fenomeno Vikipedio kaj spertoj el vikipedia trejnseminario*" (2008, kune kun Yves Nivelsteen). Kun Marek Blahuš ŝi gvidis vikipedian trejnadon dum KAEST 2012.